

INTERNACIA FERVOJISTO



ORGANO DE I.F.E.F.

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

33a jaro

Novembro-December 1981

N-ro 6



La LKK de 34...

Prezidanto: inĝ. István Gulyás (sidante). Maldekstre de li:
kasisto: Imre Domokos, sekretario: János Patay, revizoro: Lás-
zlo Zseni.

foto: Hungara Fervojisto.

NI FUNEBRAS PRO D-RO SCHLESSER

Kiel fulmo el serena ĉielo trafis nin la sciigo, ke la llan de Novembro tute neatendite forpasis d-ro Emile Schlessen, ĝenerala prezidanto de FISAIC. De 1966 ĝis 1981 li gvidis la grandan internacian federacion de la kulturflgantaj fervojistoj.

La unuan fojon li ĉeestis en nia rondo la 19an IFEF-kongreson en Fulda 1967. Tie li konatiĝis kun nia lingvo, sed ankaŭ kun la spirito, kiu vivas inter la esperantistoj. Tiu spirito same forte impresis lin kiel lian antaŭulon, la neforgesitan d-ron Marcel Mollion. Ambaŭ estis niaj amikoj. Ni citu la vortojn, kiujn d-ro Schlessen elparolis en Fulda en sia bankeda tosto:

"Hodiaŭ mi preĝis ĉe la tombo de Sankta Bonifacio: 'Faru, Dio, ke la spirito, kiun mi trovis ĉi tie en Fulda, disvastiĝu tra la tuta Mondo'".

Ni havis la ĝojon denove povi persone saluti lin en nia jubilea kongreso en Aarhus 1973 kaj ĉi-jare en Regensburg. Kun li ankaŭ estas ligita la fakto, ke ekde 1967 IFEF-kongresoj daŭre estis aranĝitaj sub aŭspicio de FISAIC. Kaj li ankaŭ estis la unua, kiu nome de FISAIC distingis IFEF-membrojn per medaloj.

D-ro Schlessen estis homo, kiu en sikunigis komprenemon, ĝentilecon, bonecon kaj helpemon. Pro lia forpaso ankaŭ ni esperantistoj ne povas ne profunde funebri. Ni perdis amikon. Kaj ni sincere kondolencas al la edzino kaj la infanoj, kiuj perdis edzon kaj patron.

estraro

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

Sekretariejo: E Henning Olsen, Åderupvej 182, DK-4700 Næstved.
Redaktoro:
Guy Delaquaize, 52, rue L.-Gandillet, F-78420 Carrières/Seine.
Bankkonto: Provinsbanken, Konto 7353-350550, DK-9800 Hjørring.
Poŝtĉekkonto: 1 25 80 35, IFEF, Tolne station, DK 9891 Tolne.

Preso: Esperanto-Press Augsburg, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg
Tel. 0821/41 92 13 + 48 81 49



INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO FEDERACIO

REGULARO

pri la Ski- kaj Lingvo-Konkursoj

- 1) La konkursojn rajtas partopreni ĉiu IFEF-membro, kies aliĝilo al la skisemajno estas valide akceptita. Ne-IFEF-membroj rajtas partopreni la konkursojn, sed ili ne povas gajni la IFEF-premion laŭ poz. 6).
- 2) Partopreni ekster konkurso eblas laŭ decido de la organizantoj.
- 3) La gajnantoj ricevas premiojn, se la organizantoj disponas ilin.
- 4) La juĝantaro por skikonkursoj konsistas el 3 personoj el 3 landoj.
- 5) Ĉiu konkursanto ricevas poentojn kalkulitajn laŭ baremo aldonita al tiu regularo.
- 6) Tiu konkursanto, kiu ricevas la plej altan poentsumon en ski- kaj lingvo-konkursoj kune, gajnas specialan premion, kiun IFEF disponigas por ĉiu internacia IFEF-skisemajno.
- 7) Gajninto de IFEF-premio ne rajtas gajni ĝin duan fojon dum la sekvontaj du jaroj, eĉ se li (ŝi) denove ricevos la plej altan poentsumon. Ĉi-kaze tiu kun la dua plej alta sumo ricevas la premion.

REGULOJ POR LA SKI-KONKURSOJ.

- 1) Ekzistas 2 kategorioj de skiantoj, nome viroj kaj virinoj.
- 2) Ekzistas en ĉiu kategorio 3 gradoj, laŭ la spertoj, nome a) komencantoj, b) progresintoj, c) spertuloj.
- 3) La skiinstruisto decidas, laŭ kiu grado konkursanto startas.
- 4) En ĉiu kategorio la konkursvojo dufoje devas esti skiata, sed validas nur la pli favora rezulto, kalkulita laŭ jena baremo.

Baremo por la ski-konkursoj

plej rapida skianto	20 poentoj
plej malrapida skianto	6 poentoj
ĉeso dum skiado	3 poentoj
nepartopreno post anonco	0 poentoj
koeficiento	2

Kalkulekzemplo

plej rapida konkursanto: 60 sekundoj = noto 20
 plej malrapida - : 92 - = - 6

Ekz. la noto por la 4a konkursanto,
 kiu bezonis 76 sekundojn, estus:

$$\frac{(20 - 6) \times (76 - 60)}{(92 - 60)} = 7. \quad 20 - 7 = 13 \times 2 \text{ (koef.)} = 26$$

REGULOJ POR LA LINGVO-KONKURSOJ

- 1) Ekzistas 3 kategorioj de konkursantoj, nome
 - a) komencantoj, kiuj lernis 1 ĝis 2 jarojn,
 - b) progresintoj, kiuj lernis pli ol 2 ĝis 4 jarojn,
 - c) spertuloj, kiuj praktikas pli longe ol 4 jarojn.
- 2) La juĝantaro devas konsisti el 3 personoj el 3 diverslingvaj landoj.
- 3) La juĝantoj rajtas partopreni, sed ilin notas la aliaj juĝantoj.
- 4) La juĝantoj mem decidas pri la maniero, prinoti la konkursantojn.
- 5) La rezulto estas kalkulata laŭ jena baremo kaj laŭ sama maniero kiel la ski-konkursoj.

Baremo por la lingvo-konkursoj

plej alte notita konkursanto	20 poentoj
plej malalte notita konkursanto ..	6 poentoj
ĉeso dum partopreno	2 poentoj
nepartopreno post sinanonco	0 poentoj
koeficiento	3

Validigita de la IFEF-estraro en Parizo

14an de Septembro 1981

Giessner
 (prez)

PRI LA EVOLUO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Post la 33a IFEF-kongreso la IFEF-prezidanto en Aŭgusto vizitis Ĉeĥoslovakion. Li parolis kun la prezidanto de Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, s-ro Jaroslav Kašparec, kaj kun la prezidanto de Ĉeĥoslovaka Fervojista Esperanto-Federacio, s-ro Miloslav Blažek, por informi sin pri la problemoj de la du fervojistaj sekcioj.

Poste, la 6an de Aŭgusto, okazis kunveno en la sidejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Praha, en kiu partoprenis ties prezidanto d-ro Jaromír Jermaň kaj sekretario s-ro Zdenko Křimský, krome s-ro M. Blažek, s-ro Jaromír Babička kaj la IFEF-prezidanto Joachim Giessner. Celo de la kunsido estis trovi vojon el la momenta kriza situacio. En agrabla atmosfero estis prezentitaj la diversaj starpunktoj, kaj fine estis subskribita de ĉiuj protokolo, kies ĉefaj pozicioj estis:

- La agado de la fervojistoj esperantistaj ne kontraŭ la ĉeĥoslovakajn leĝojn.
- La esperantistaj fervojistoj

estu organizataj kiel Fervojistaj Sekcioj en ĈEA resp Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR (AE SSR).

- Por ambaŭ sekcioj estas antaŭvidita komuna gvidkomisiono, kiu fariĝos la tutŝtata partnero por IFEF.

Krome ĈEA akcentas, ke la estontaj fervojistaj membroj neniel suferos financajn malavantaĝojn, eĉ male, kaj ĝuos la moralan subtenon de ĈEA resp. AE SSR.

S-ro Blažek prezentis la protokolon al ĈS FEF la 15an de Aŭgusto. Ĝi ne estas akceptita, ĉar rigardita ne ŝufiĉe kompleta, kaj oni proponis starigi komunan komisionon por trovi solvon de la konflikto. Lastmomente atingis nin la informo, ke s-ro Blažek demisiis kiel prezidanto de ĈS FEF.

IFEF nur povas esprimi sian esperon, ke en la intereso de ni aj ĉeĥoslovakaj kolegoj kaj ankaŭ de IFEF tre baldaŭ estos trovata kontentiga solvo en la agado ambaŭflanka.

IFEF-estraro.

FIN - kaj NOVJARAJ SALUTOJ

OKAZE DE LA KRISTNASKAJ FESTOTAGOJ KAJ LA TRANSIRO AL NOVA JARO LA ESTRARO DE IFEF KORE SALUTAS ĈIUJN MEMBROJN, LANDAJN ASOCI-OJN, KUNLABORANTOJN KAJ AMIKOJN DE IFEF.

Ni dankas pro agrablaj rilatoj dum la baldaŭ pasinta jaro kaj deziras al ĉiuj fortojn kaj entuziasmon en la daŭra laboro por IFEF kaj ties idealoj.

IFEF-estraro.

REZULTOJ DE LA LITERATURA KONKURSO

okazinta dum la kongreso en Regensburg

Originala prozo

1. "Foriro" de Zora Heide, Svedio (premiita)
2. "Désastre" de Vesna Skaljev, Jugoslavio
"La unua Kontakto" de H.D. Hartig, Germanio
"La misjuĝo de ministro" de Germaine Lemmonier, Francio
"Tian mi neniam vidis" de Marinko Ĝivoje, Jugoslavio
3. "Bona Vojaĝo" de H.D. Hartig, Germanio
"Senrevene" de M. Ĝivoje, Jugoslavio
"Vetkuro" de V. Slajer-Race, Jugoslavio

Originala poezio

1. "Vivtraĵo" de Ursula Zybura, Pollando (premiita)
2. "Legendo pri la bona traĵo" de Zora Heide, Svedio
"Masakro" de Maria Teresa Netola, Italio
3. "Pri anĝeloj, flugantaj sur la reloj"
de Jiri Karen, ĈSSR
"La duane Aŭgusto" de Maria Vittoria Mandreoli, Italio
"La vivo kaj vagonaroj" de Jiri Karen, ĈSSR

Tradukita prozo

1. "Fervoja Katastrofo" moderna fabelo el la novelaro
"Kornmod" de Johannes Buchholtz,
trad. el la dana de Erna Hauge, Danio (premiita)
2. Fragmento el la romano "Pupo" de Prus
trad. el la pola de Irene Missiuri, Pollando
"La lasta vespero" (el la vivo de Barrieristo)
de Milan Dimitrijevič,
trad. el la kroata de Ludoviko Sekereš, Jugoslavio
3. "Kirastraĵo" rakonto de Anĝelke Martič,
trad. el la kroata de Marinko Ĝivoje, Jugoslavio
"La fluganta skoto" el leteroj de Eric Gill,
trad. el la angla de Douglas Normann, Anglio
"La unua fervoja stacio" el la libro "Der tolle (= kontraŭracia) Bomberg" de Jos. Winkler,
trad. el la germana de Josef Bode, Germanio

Tradukita poezio

1. "Sur Fervojo" poemo el la jaro 1847 de Sándor Petőfi,
trad. el la hungara de Georgo Szondi, Hungario (premiita)
2. "Noktotraĵo" el la libro "Dansk Lyrik" de Bundgaard
Povlsen "Vågetid" 1955
trad. el la dana de Gunhild Halager, Danio
"Ĉiutagaj versoj" de Erik Ransemar
trad. el la sveda de Zora Heide, Svedio
3. "En la ĉefa stacidomo" poemo de Marija Toplak,
trad. el la kroata de Zora Heide, Svedio
"La fervoja horaro" el la libro "Allzeit gute Reise"
(ĉiam bonan vojaĝon) de Eugen Roth
trad. el la germana de Manfred Retzlaff, Germanio
"Traĵoj kreskas en mi" de Milorad Tasovac
trad. el la kroata de Ludoviko Sekereš, Jugoslavio
"En la aŭtuna vespero" el "Vartegn" 1959 de Bundgaard
Povlsen
trad. el la dana de Gunhild Halager, Danio.

E. Kruse

ANONCETO

LA VERDA RELO

Fervojo en literaturo (originala kaj traduka krestomatio)
broŝurita, laŭ angla bindo, Din A 5, paĝoj 56,
prezo 15 germanaj markoj inkluzive sendokostoj
mendebla ĉe Elfriede Kruse, Wiener Str. 121,
D-6000 Frankfurt/Main 70.

La sumo estas pagenda al Sparda-Bank 6000 Frankfurt/Main, poŝt-
ĉeka konto Frankfurt/Main Nr 56908, kun la aldono (favore El-
friede Kruse, Konto 129957).

34a
ESPERANTO Kongreso
de IFEF
Boletenfired

Mejo 1982

La 34a IFEF-KONGRESO en HUNGARIO

Malgraŭ nia peto ni ne ricevis el LKK novajn informojn pri la
organizo de la venonta IFEF-kongreso, aŭ pri la loko mem.

Do, ni petas vian pardonon pro tiu manko da informado, pri kiu
ni ne kulpas, kaj ni invitas vin legi aŭ relegi la jam aperigi-
tajn artikolojn en IF/4-81 paĝo 47 kaj IF/5-81 paĝoj 65-66.

la redaktoro

NOVAĴOJ PRI POLLANDO

Fervojista renkontiĝo okazis je dimanĉe la 7an de julio. Ĉeestis la prezidantoj de la fervojistaj kluboj el Bydgoszcz, Opole kaj Varsovio kaj krome dudeko da fervojistoj el pluraj aliaj urboj.

S-ro De Bruyne L., staciestro el Linkebeek prelegis pri la senco kaj la valoro de la esperantistaj vintraj renkontiĝoj kaj speciale pri la fervojistaj t.n. IFES; li prezentis sian esperantparolitan 8 mm kolorfilmon pri la 22a IFES okazinta en Bohinj, Jugoslavio en februaro pasinta, al kiu partoprenis 111 fervojistoj el 12 landoj, el kiu, kiel plejmultnombra landa grupo, 13 belgoj.

Post la filmprezentado okazis tre fruktedona kaj esperplena diskuto pri la movado ĝenerale kaj speciale pri la fervoja kompreneble.

En Bydgoszcz, Opole kaj Varsovio okazas kursoj por fervojistoj kun respektive dudeko da kursanoj.

Laŭ ekzemplo de la Pola Komputista Rondo, fondita en januaro pasinta, nun ree povos esti kreata fervojista fakgrupo kadre de la agado de Pola Esperanto Asocio.

La aliĝo al IFEF nun ankaŭ plifaciliĝos, ankaŭ por individuoj. Se estus devizaj malfacilaĵoj, la polaj fervojistoj ĉiam senpage povas aliĝi al la koresponda servo, kiu sinsekve havigos la sendevizan aliĝeblecon.

La starigo de la fervojista fakrondo estas planita por oktobro estonta kadre de la VIIa Internacia Foiro de Esperanto-Turismo okazonta en Varsovio de la 18a ĝis la 25a de oktobro.

Samtempe estos prezentataj definitivaj programoj por la organizado de la 24a IFES en la alta Tatros, en la regiono de Zakopane, kaj veturo kun propra loĝvagono al la Universala Kongreso 1982 en Antverpeno.

Kadre de tiuj tuturbaj festoj, la plensemajna riĉa Esperanto-programo estis sukcesplena abeluja renkontiĝejo kaj ora ideobanko por kvindeko da geaktivuloj kaj tricento da geesperantistoj kaj gesimpatiantoj el dudeko da landoj, tiel el oriento kaj okcidento.

(Respondeca pri tiu artikolo: S-ro De Bruyne L., staciestro, Linkebeek)

el "Tamen" (BEFA-organo)

GRAVAJ ENHAVAĴOJ

Regularo pri la Ski- kaj Lingvo-konkursoj	paĝo 75
Rezultoj de la Literatura Konkurso en Regensburg	78

La redaktotino por la venonta IF estas 15.1.82.